

## **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2021-10-15 ĝis 2022-01-15.

## **Eventoj**

### **Kongreso-2022**

Malgraŭ neklara situacio pri pandemio, daŭras la preparado por la ĉeesta/hibrida kongreso-2022. Novembre en kunsido de ILEI-Estrararo estis aprobitaj kotizoj. Ili videblas ĉe <https://2022.kongreso.org/ali%C4%9Dilo#kotizotabelon>. Kotizo por la reta partopreno estos 5-ono de la ĉeesta. La estrarano pri kongresoj Laura Brazzabeni skizis la buĝeton de la kongreso. Ĝi estis kalkulita por proksimume 50 partopenontoj, kio estas la plej modesta antaŭvido. LKK-ino Suzanne Roy estas en konstanta kontakto kun la universitato, kie okazos la Kongreso. Jam estas konfirmite, ke ĉambroj de la universitato povas esti menditaj nur pere de la LKK. UEA promesis helpi pri la libroservo. La Estraro estas kompilanta la programon de la kongreso. Jam estas planataj: komitatkunsido, du-taga ILEI-Simpozio, lingva festivalo, internacia vespero, prezento de la sekva kongreso, buso al Montrealo post la fino de la Kongreso. Oni pritaksis tre alta la gazetaran servon.

Por la Simpozio la estrarano Fernando Pita pretigis la alvokon por IPR. Estas tri limdatoj: por anonci sian disponeblecon, por sendi la resumon de siaj prezentaĵoj kaj poste por sendi la tutan tekston por simpligi publikigon.

Tamen pro la kronviroza situacio en Kanado kaj en la mondo ĝenerale la Universitato definitive respondos pri ĉeesta kongreso iom poste. Laura kaj Radojica estas planantaj ankaŭ virtualan okazigon de la kongreso. Verŝajne, definitive la formato de la ĉi-jara kongreso fiksiĝos ne pli frue ol dum Pasko.

IPR-1 diskonigas la alvokon kaj informon pri la kongreso en Kebekio.

### **Kongreso-2023**

LKK en Massa detale pristudis la regularon de ILEI pri kongresoj kaj sugestis al la Estraro amendojn. La proponita teksto estas diskutata kaj pritaksata ene de la Estraro.

### **La Estraro**

Regule okazis retaj estrarkunsidoj pere de Zoom. Unu el la kunsidoj – 2021/11/27 – okazis kun eksprezidantino Mireille Grosjean kaj estis dediĉita al la projekto Multlingva Akcelilo, kiu gajnis en 2021 la monsubtenon de EU.

La kasistino Karine Arakeljan preparis detalan analizon de la financa stato de ILEI. En la aktuala stato ILEI havis deficiton en 2017-2019, 2021 jaroj. En 2020 la Ligo gajnis la sumon je 285 EŬR.

Novaj estraranoj preparis dokumentojn por registrado ĉe la Komerca Ĉambro (KvK) en Roterdamo, Nederlando, kie situas oficiala sidejo de ILEI. La procezon ĉe KvK gvidas Ralph Schmeits, la oficisto de CO de UEA kaj koncerna komisiito de ILEI, kunlabore kun Radojica Petrović, estrarano kiu jam havas registritan subskribon ĉe KvK, konforme al ties reguloj. Dum sia reta kunsido 14.01.2022 la Estraro decidis per voĉdono rajtigi la sinjoron Ralph Schmeits esti oficiala reprezentanto de ILEI ĉe la Komerca Ĉambro por formalaj burokrataĵoj. Fakte ILEI antaŭlonge jam nomumis lin komisiito por tiu bezono, sed tio ne estis formale registrita ĉe KvK. Per tiu formaligo, la procedo de registrado de estraranoj estonte multe plisimpliĝos.

Decembre okaze de Zamenhof-tago la estraranino Marija Jerković preparis ekspozicion pri Esperanto en la publika urba biblioteko de Zagreb, Kroatio. Ĉi-okaze ankaŭ internacia kunlegado de teksto rekomendiĝis flanke de ILEI, pri kio vi legos en tiu ĉi Raporto.

## **Sekcioj**

Survojas detala analizo pri ILEI-sekcioj tra la tuta mondo fare de Stefan MacGill kunlabore kun Renato Corsetti kaj la estraranino pri landa agado Marija Jerković.

## **Kapabligo**

**La vica ILEI-forumo okazos la 21-an de januaro 2022 kun la temo “Edukado al interkultura kompetento” je la kutima horo 15.30 UTC.**

Januare komenciĝas en Toskanio (Italio) la praktike instrua fazo de projekto bazita sur scienca esplorado de internaciaj spertoj kaj titolita “30 oraj horoj”. Ĝi celas kiel eble plej grandskale instrui Esperanton en la regiono ankaŭ por plibonigi la rezultojn de superaj mezlernejoj en la testadoj de la nacia taks-instituto INVALSI. “30 ore d’oro” (30 oraj horoj) estas prestiĝa projekto, kiun la LKK de la ILEI-kongreso, la Itala Instituto de Esperanto kaj la Esperanto-Grupo de Massa prilaboras kune kun la Regiona Lerneja Oficejo, kaj kiu kulminos en la somero de 2023 per la monda kongreso de ILEI okazonta en Marina di Massa.

Ĉe la retejo de Irana Esperanto-Asocio <https://www.espero.ir/eo/esperanto-kurso-araba/> pere de la prezidanto de ILEI Ahmad Mamduhi aperis filmoj de arablingva Prezenteto pri Esperanto kune kun kvar unuaj lecionoj de la *Rekta Metodo* de Stano Marček. En la sama retejo, kadre de projekto “Esperanto-Kursaro Tibor Sekelj”, troviĝas ankaŭ alilingvaj instruadoj de Esperanto per volontulaj instruistoj, i.a. per la svahila, la kurda, la indonezia kaj la vietnama lingvoj. ILEI planas subteni la projekton varbante volontulajn Esperanto-instruistojn de diversaj etnolingvoj instrui sia-lingve Esperanton. Krome, la informo estos vaste disvastigota tra la retejo kaj aliaj kanaloj de ILEI.

## **Projektoj**

### **Komuna Legado**

Ĉi-jare por celebri la Zamenhofan Feston – la 15-an de decembro, kiu estas ankaŭ tradicie la Tago de la Esperanta libro, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj proponis simbolan tutmondan legadon de la komenco de la libro *Hodler en Mostar* (2006) de Spomenka Štimec, fama esperant-lingva verkistino el Kroatio. *Hodler en Mostar* aperis en la kroata (2020) kaj korea (2021) tradukoj kaj estas nun tradukata ankaŭ al la japana. Tio estas romano verkita originale en Esperanto pri la vivo de la svisa pentristo Ferdinand Hodler kaj du el liaj pentraĵoj, kiuj malaperis. Li estis la patro de Hector Hodler, fama Esperanta pioniro kaj la fondinto de Universala Esperanto-Asocio. Tiu elekto estis ankaŭ omaĝo al la antaŭa prezidantino de ILEI Mireille Grosjean, kies familio produktis 9 pentristojn, inter kiuj Philippe Robert estis rivalo de Ferdinand Hodler. ILEI sincere esperas, ke nia komuna legado de la komenco de tiu ĉi inspiriga libro pri nia historia fono povis ne nur pasigi al ni ĉiuj plaĉan Tagon de la Esperanta libro, sed ankaŭ pli multe konigi la interesan verkon de la aŭtorino.

### **Premio La Torre**

Post anonco de la tria Premio Maŭro La Torre en septembro 2021 venis ĝis la limdato por anonci sian intencon partopreni (la 1-a de januaro 2022) 3 proponoj kun taŭgaj temoj. Ni povas rimarki, ke la konkurso iĝis pli internacia en sia partoprenado kaj ni atendas elstarajn kontribuojn antaŭ la 30a de aprilo 2022, la limdato por prezenti la finan esplorrporton.

### **Universitata agado**

Decembre de 2021 kaj januare de 2022 la Scienca Asocio de la Universitato de Tehrano pri Turisma Administrado okazigis seriojn da dulingvaj (en la persa kaj Esperanto) ret(sem)inarioj kun la titolo “Internacia retinariato pri Turismo kaj Esperanto”. La organizantoj de la eventoj

estas la Prezidanto de ILEI Ahmad Reza Mamduhi kaj IrEA, la ĉefa helpanto estis UEA. Flanke de ILEI prelegis en la retinarioj la vicprezidantino Alessandra Madella, Luigia Oberrauch Madella, la sekciestro de la itala ILEI-sekcio kaj Zsófia Kóródy, la estrino de ICH (Interkultura Centro Herzberg) kaj la germana ILEI-sekcio. La dua evento el la retseminarioj inkluzivis i.a. prelegojn:

D-ino Alessandra Madella, Luigia Oberrauch Madella: “Gastronomia turismo en Parmo, Italio”;

S-ino Zsófia Kóródy: “Lerneja projekto “GUTO” pri turismo”;

Prof. Davide Astori: “Turismo: historio de vorto kaj uzo en Esperanto”;

D-ro Maĝid Ĝavid: “Sporta turismo”.

La registraĵoj spekteblas ĉe:

<https://www.youtube.com/watch?v=6Pe9lcohfuc> (31 dec. 2021)

<https://www.youtube.com/watch?v=iUVgxNFG8dc> (7 jan. 2022)

La tria retinatio okazis en la 13a de januaro, kaj la postaj tri okazos post la universitataj ekzamenoj ekde la 11:30-17:30 UTC respektive en la 3-a, 10-a kaj 17a de februaro 2022, ĉiuj ili vive spekteblas kaj en la jutuba kanalo de UEA <https://www.youtube.com/UEAviva> kaj en Zoom: <https://us02web.zoom.us/j/82300075216> (Nur se necesiĝis: kunven-identigilo: 82300075216, pasvorto: esperanto).

ILEI planas alŝuti en sian jutuban kanalon selektitajn partojn de tiaj prelegoj, kiuj plej kongruas kun ties celoj kaj serĉas kunlaboranton por tiu laboro.

Ĉiumonate kunsidas la Universitata Laborgrupo de ILEI/ESF/UEA/CED/TEJO por sekvi aktualajn kaj iniciati novajn E-projektojn universitatnivele. Unu el la realigataj projektoj estas IKIKO (Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado), iniciatita kaj gvidata de Vicente Manzano Arrondo - Viko kun subteno de la prezidanto de ILEI Ahmad Mamduhi. La dua virtuala sesio de IKIKO okazis la 19-an de dec. 2021 en kvar sidejoj en Irano, Hispanio kaj Sudameriko.

En la projekto de retrevuo pri interkultura komunikado, titolita “Interkompreno”, aktuale estas traktata temaro pri kiu okupiĝu la revuo ĝenerale, kaj speciale temoj por la unua numero, laŭplane aperonta dum 2022. Aparta defio estas krei Esperantan version de OJS (Open Journal Systems), malfermkoda kaj senpage havebla programaro por publikigado de sciencaj retrevuoj, kiu estos uzata por “Interkompreno”. Pri tiu ebleco nun, en la koncerna laborgrupo, okupiĝas Radojica Petrović.

En sia kunsido komence de januaro 2022 la Laborgrupo prikonsideris notindan universitatan aktivecon en Ĉinio, pri kiu, ŝajne, en Eŭropo oni ne scias sufiĉe multe. Necesas plifortigi interŝanĝon de informoj kaj kunlaboron inter universitataj E-agantoj de diversaj mondopartoj.

## **Eldonado**

### **Juna Amiko (JA)**

**Karaj membroj de ILEI! La Estraro ĝoje kaj fiere rememorigas, ke nia “juvelo” - la revuo *Juna Amiko* festos en novembro de 2022 sian 50-jaran jubileon! La unua numero aperis en**

## **novembro de la 1972 jaro. La Estraro planas grandan reklaman kaj celebran kampanjon kaj alvokas ĉiujn aliĝi kaj subteni nian faman kaj ege utilan revuon!**

Tiucele la redaktoro Stano Marček kun sia filino Linda renovigis la varbilon pri JA, Elena Nadikova preparis alvokon kaj dissendis ambaŭ dokumentojn tra ĉiuj kanaloj de ILEI.

### **ILEI en la Reto**

Ekde novembro 2021 la vic-prezidantino Alessandra Madella fariĝis unu el la administrantoj de la ILEI-kanalo ĉe Jutubo (<https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI>). Ŝiaj rajtoj tie permesos alŝuti al la kanalo ĉiujn gravajn vide(et)ojn rilate al agado de la Ligo.

De oktobro 2021 ĝis januaro 2022 en la kanalo estis surretigitaj sekvaj materialoj:

- la alparolo de Maximiliano Garcia nome de ILEI dum la 41-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo;
- la priskribo de la projekto “30 Oraj Horoj”, fare de Bruĉjo Kasini, estro de la LKK de Massa 2023, dum la evento Verden en Parmo; alia video por Verden fare de Inĝ. Franco Bressanin;
- video pri Hodler en Mostar fare de Mirejo;
- videoj pri origamio fare de Larysa Osadchuk
- kaj prezenta filmo de la franca mezlernejo Victor Considerant fare de instruisto Emmanuel Desbrières.

Ni esperas, ke samideanoj en la mondo aktive kontribuu videojn al la kanalo, precipe pri lerneja kaj universitata agado. Didier Janot lanĉis alvokon tiucele en diversaj komunikiloj. La retaj kanaloj de ILEI konstante kompletigas pere de la samideanoj el diversaj landoj. ***Grandan dankon iru al ĉiuj, kiuj disvastigas novaĵojn pri Esperanto kaj ĝia instruado!***

Decembre dum sia kunsido (2021/12/03) la Estraro pridiskutis la demandon pri reta komunikado de ILEI. Necesas kontroli kaj ĝisdatigi kaj pliigi ĉeeston kaj prezentadon de ILEI tra la diversaj retaj kanaloj kaj regule evoluigi tiun agadon. Tamen mankas sufiĉaj fortoj por tiel granda aktivado ene de la Estraro mem. Do teamo kreiĝantas pri la reta komunikado de ILEI, kien eniris Fernando Pita, Marija Jerković kaj Radojica Petrović. La teamo aktive serĉas volontulojn por vigligo de tiu agado de la Ligo. Alvoko dissendiĝos ĉi-rilate flanke de ILEI. Dume Jozefo Nemeth daŭrigas aktualigadon de la nuna retejo ilei.info sub gvido de Radojica Petrović kaj kunlbore kun aliaj estraranoj.

### **Kunlaboro kun enmovadaj institucioj**

**Kun Radio “Muzaiko”:** la programero/reklamo "Alvokon por la Premio Maŭro La Torre de ILEI laŭtleĝis Alessandra Madella" kadre de la programo de Muzaiko aperis ĉiun duan semajnon ĝis fino de 2021, nome: dum 2021-11-17, 2021-11-29, 2021-12-14, kaj 2021-12-30.

### **Kun UEA**

Je la fino de oktobro 2021 Alessandra Madella (“30 Oraj Horoj”) kaj Maxiliano Garcia (Kungfua Kuniklito) finsendis la respektivajn materialojn por la Premio Hamdan de UNESKO, kun la subteno de ILEI kaj UEA. La partopreno en konkurso por tiu prestiĝa Premio pri edukado certe donas multe da internacia videbleco al Esperanto kaj al la agadoj de ILEI.

## **Kun Ĉina Radio Internacia (CRI)**

Danke al la kunlaboro de Alessandra Madella kun Ĉina Radio Internacia (CRI) sur ĝiaj Esperanto-paĝoj regule aperas artikoloj pri Esperanto kaj ĝiaj movadanoj. Vidu, ekz-e, ŝian intervjuon kun fama kroata esperantistino Spomenka Štimec pri literaturo: <http://esperanto.cri.cn/recommended2/3842/20220104/726254.html>

## **Kunlaboro kun ekstermovadaj institucioj**

### **ILEI ĉe Unesko**

De la 9-a ĝis la 12-a de novembro la vic-prezidantino Alessandra Madella partoprenis en la 41-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo, kie ŝi reprezentis ILEI-on, kio jam iĝis bona tradicio en la eksteraj rilatoj de ILEI. La 11-an de novembro 2021 kadre de la 41-a Sesio okazis Tutmonda Kunveno pri Edukado 2021. Tie partoprenis ankaŭ Maximiliano Garcia, kiu alparolis nome de ILEI. La filmeton pri tiu alparolo eblas spekti ĉe la Jutub-kanalo de ILEI (<https://www.youtube.com/watch?v=5QomYe6LR28>). Aldone: la tagon antaŭe en tiu sama kunveno partoprenis la franca prezidanto E.Macron kaj aliaj prezidantoj kaj ministroj pri edukado. Matene de 2021/11/11 ankaŭ parolis aliaj ministroj kaj prezidantoj; posttagmeze alparolis nur reprezentantoj de ŝtatoj kaj du reprezentantoj de la civilaj socioj: feminista asocio kaj ILEI. Dum la fina faka kunsido pri edukado de Unesko la prezidantino de la asembleo denove menciis, ke du membroj de civila socio alparolis la asembleon en la antaŭaj tagoj. Rezulte la nomo de ILEI estos ankaŭ en la protokolo de la fina kunsido de la Ĝenerala Konferenco de Unesko. Do, tiu evento iĝis nova paŝo en rilatoj inter Unesko kaj la Ligo. Maximiliano Garcia kaj Alessandra Madella ankaŭ disvastigis materialojn rilatajn al la Kungfua Kunikleto kaj al la projekto de ILEI “30 Oraj Horoj”.

Informo pri tiu evento aperis en la *Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj “Esperanto por UN”* de Humphrey Tonkin (la numero 55, novembro-decembro 2021).

Ekde 2022 la reprezentantoj de ILEI ĉe Unesko laŭ la listo en IPR iĝis Alessandra Madella, Didier Janot, Emmanuel Desbrières, kaj Maximiliano Garcia. Sed ni estas parolantaj ankaŭ kun aliaj homoj, kiuj povus reprezenti ILEI dum venontaj eventoj tie.

### **Kun FIPLV**

Dum sia kunsido en la 2021/12/03 la Estraro pridiskutis la demandon pri daŭra kunlaboro kun FIPLV – Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvaj, pri ĝiaj strategio, perspektivoj kaj prioritatoj. ILEI plu membras en FIPLV por 2022. La kontaktpersono de ILEI ĉe FIPLV estos la prezidanto Ahmad Mamduhi.

### **Kun CALICO**

Dum sia reta kunsido 2022/01/14 la Estraro de ILEI pritraktis la eblan kunlaboron kun CALICO (Computer-Assisted Language Instruction Consortium), kiu donas ĉiujare premion kun la nomo "Esperanto" de ESF al la plej bona lingva retejo de la jaro. La temo de la enketo estas "Internaciaj perspektivoj pri virtuala lingvoinstruado post Kovim-19". Kvankam la enketilo estas en la angla lingvo, ĝi donas manieron indiki la subtenon de instruistoj de Esperanto, disvastigante la enketon en pli multajn landojn. ILEI subtenos la iniciaton kaj kontribuos pri disvastigo de la alvoko tra siaj kutimaj kanaloj.

**Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Ahmad Reza Mamduhi

2022-01-15